5-a Jaro
N-ro 2 (23).

Julio 1930
*Aperas dumonate.*

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : WILHELM SOLZBACHER.

ENHAVO :

**A. Dombrovski,** Himno. — **Wilhelm Solzbacher**, La junularo salutas sepdekjarulon ! — **V. Kazlaŭskas-Martinas Štonis,** Vizito ĉe profesoro prelato Dambraŭskas (Dombrovski). — **A. Dombrovski**, El liaj poemoj (Al la papo, — Homa indeco — Esperanto — Litova popolkanto) — **D-ro H. C. E. Zacharias,** Hinduismo kaj katolikismo. —**Juan Maria Hashimoto**, Letero de juna japana katoliko. — **Sigrid Undset,** Bolŝevismo kaj ekonomia revolucio. — **Prof. D-ro Francis J. Haas**, La Katolika Asocio por Internacia Paco en Usono. — **Spegulo de la kulturo** (Li ne volis mensogi — Prezidanto Masaryk al la infanoj — Laboro kaj armiloj en Soveta Rusujo — Malbonaj legaĵoj kaj krimoj — Pri plakatgluaĵo, kaprinoj kaj diplomata konflikto — Pri sep homoj kaj unu dikhaŭtulo) **El la Esperanto-movado.** — **El la katolika paca movado** — **Nia movado.** — **Gravaj internaciaj kongresoj kaj kunvenoj 1930.**

REDAKCIO : **Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.**

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,
Köln—Dellbrück, Bensberger Marktweg 63, Germ. (Regina Reiff).

# Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

| Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo | Lando | jara abono | kun MOKA-kotizo | simpla kotizo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Anglujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Hungarujo | 2,4 p | 4 p | 2 p |
| Argentino | 1,50 p | 2 p | 1 p. | Italujo | 9 l | 14 l | 5 l |
| Azio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Japanujo | 2 s | 3 s | 1 s 3 d |
| Aŭstralio | 2 s | 3 s | 1 s 3 d | Jugoslavujo | 30 din. | 40 d | 15 d |
| Aŭstrujo | 3,40 s | 5 s | 2 s | Litovujo | 5 lit. | 7 l | 3 l |
| Belgujo | 3,50 b | 6 b | 2 b | Luksemburgo | 18 fr | 25 fr | 10 fr |
| Brazilio | 4 mr | 5 mr | 2 mr | Meksiko | 0,50 dol | 0,75 d | 0,30 d |
| Ĉeĥoslov. | 14 kr | 20 kr | 10 kr | Nederlando | 1,25 fl | 2 fl | 0,80 fl |
| Danujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr | Polujo | 4zl | 6 zl | 3 zl |
| Danzig | 2 g | 3 g | 1,20 g | Portugalo | 8 esc | 12 e | 5 esc |
| Francujo | 12 fr | 18 fr | 6 fr | Rumanujo | 80 lei | 100 l | 40 lei |
| Germanujo | 2 M | 3 M | 1,20 M | Svedujo | 2 kr | 3 kr | 1 kr |
| Grekujo | 38 dr | 50 dr | 15 dr | Svisujo | 2,50 fr | 4 fr | 1,50 fr |
| Hispanujo | 3 p | 4,50 p | 2 p | Usono | 0,50 dol | 0,80 dol | 0,30 dol |

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevos nian jarlibron kaj aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

*Abonejoj :* Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA, kies adresojn vi trovas en alia loko de la gazeto.

*Poŝtkontoj.* Germanujo : Köln 48037 (Wilh. Solzbacher, Köln) ; Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo: Wien D 30461 (Ernst Gœrlich, Wien 3).

**POR PROPAGANDI NIAJN IDEOJN** en la katolika junularo tutmonda, MOKA eldonas propagandgazetojn nacilingvajn. Ili devas enpenetri ĉie en la rondojn kaj asociojn. Ĉiu propagandisto portu daŭre kvanton en sia poŝo, por disdoni aŭ disvendi ilin.

« **ERWACHENDE JUGEND** » nomiĝas la **germanlingva** bulteno aperanta dumonate. La propaganda eldono B (eldono A aperas en formo de revuo) kostas nur **po 3 fenigojn;** sed oni forsendas nur minimume 25 ekzemplerojn. Mendu !

« **JEUNESSE MONDIALE CATHOLIQUE** » **estas** destinata por niaj **franclingvaj** amikoj kaj kostas **nur 1 francan frankon** por 10 ekz., 4 fr. por 50, 7 por 100 ekz. Mendu tuj !

**En angla kaj hispana lingvoj** similaj bultenoj estas nun preparataj. Interesuloj jam nun mendu ĉe la Eldona Kooperativo J. B. aŭ ĉe la kompetenta nacia sekretariejo.



# HIMNO

De A. Dombrovski,

dediĉita al la internacia Esperantista kongresanaro en Boulogne-sur-Mer, 1905.

El ĉiuj landoj kaj el ĉiuj gentoj
Ni kunvenintaj Vin adoras, Di' !
Al vi sin turnas niaj piaj sentoj.
Kaj nia kanto sonas nur al Vi!

Vi — nia patro, ni ja — Viaj idoj,
Kaj reciproke — fratoj al ni mem;
Venu do amo, estu for dividoj,
Venu frateco kaj pereu prem'!

Per la donita al ni krea forto
Via, Kreinto, estas ni imag'.
Vi kreis mondon tutan per la Vorto,
Ni Vin imitas per la Vort' kaj ag'.

De ni kreitaj estas art', scienco,
Nun celas mondon ni de l' ideal';
Tre malfacila estis krekomenco,
Hodiaŭ kreas ni en granda skal'.

Laŭ Via diro : ekposedu teron!
Ni ĝin okupis kaj posedas nun;
Transnaĝas marojn, sondas atmosferon,
Kaj ĉie loĝas, kie brilas sun'.

Al ni obeas fortoj de naturo.
Al ni jam servas elektrec', vapor';
Nur peka sekvo de Babela turo
Nin malhelpadis en la kre'labor'.

Sed jen ĉi tiu baro forigita:
Homon kompreni povas ĉiu hom'.
Ĉar estas lingva komprenil' kreita
Kaj ĉie sonas ĝia bela nom'.

Ĝin al Vi, Dio, ni kun preĝ' oferas.
Volu el alta beni ĝin ĉiel'!
Kun ĝia helpo baldaŭ, ni esperas.
Plej sankta estos atingita cel' :

Sub la konduko civilizacia
Kuniĝos granda de nacioj ar';
Kaj antaŭsigno de la regno Dia :
Aperos unu jam ĉiuhomar'.

Kaj ĝi ne estos plu estaĵo muta,
Ĉar propran lingvon havas kun konsci';
Kaj tiun voĉon de l' homaro tuta
Atentos reĝoj kaj ĉiu naci'...

Ho, venu tiu hor' de unueco!
Rompon, dividon amas nur satan'...
Patro, ni preĝas Vin pri la frateco,
Nian laboron benu Via man'!...

# La Junularo Salutas Sepdekjarulon

**Je la 70-a naskiĝtado de Prof. Prelato Dombrovski en Kaŭnas (Litovujo).**

La Juna Batalanto en ĉi tiu numero prezentas ĝojajn gratulojn al tre kara amiko, kiun ni ŝatas kiel junularo, kiel katolika junularo, kiel internacia junularo kaj kiel Esperantista junularo...

Ne estas nia kutimo, ofte festi personojn, kaj ekstera « eminenteco » al ni ĝenerale ne multe imponas. Sed kiam ni trovas homon, el kies vivo kaj agado ni povas multege lerni, kiam ni renkontas « eminentulon », pri kiu ni sentas el sincera koro, ke li estas iel parenca al ni kaj al la brulo de nia volado, tiam ni havas kaŭzon kaj rajton, por ĝoji kaj partoprenigi je nia ĝojo nian kunbatalantaron tutmondan.

Tia homo estas Profesoro Prelato A. Dombrovski aŭ, kiel li nomiĝas en la lingvo de sia litova popolo, Dambraŭskas, kiu povos festi en aŭgusto nunjara sian 70-jaran naskiĝtagon.

Anstataŭ longa biografio jen kelkaj « sekaj » datoj el lia vivo : Aleksandro Dambraŭskas naskiĝis la 26 aŭgusto 1860 en vilaĝo Kuroniai, distrikto de Ukmerge. La litova lando tiam apartenis al Rusujo, kaj la popolo, ĝia lingvo kaj la religio de ĝiaj patroj, la katolikismo, estis subpremataj de la rusa cara despotismo. Dambraŭskas absolvis la gimnazion en Šiauliai kaj poste studis matematikon en la universitato de S. Peterburgo, tiama ĉefurbo de Rusujo kaj nuna Leningrad. Poste, en la jaroj 1881-1888 li vizitadis la katolikan pastran akademion en S. Peterburgo kaj ricevis la sakramenton de la Sankta Pastrigo la 29 aprilo 1889. En sia studotempo li jam treege interesiĝis pri la problemo de internacia lingvo, unue okupiĝis pri Volapük, poste tuj post la publikigo de la Unua Libro de D-ro Esperanto (D-ro L. L. Zamenhof) aliĝis al ties Lingvo Internacia kaj tiel fariĝis depost 1887 unu el la plej fervoraj Esperantistoj. — Post pastriĝo li fariĝis profesoro de religio en la realgimnazio de Panevezys. Sed tie li ne longe restis, ĉar lia arda katolika fervoro kondukis lin en konflikton kun la ŝtato : Li malpermesis al siaj katolikaj lernantoj, obei rusan ordonon pri vizitado de rusa-ortodoksa preĝejo, kaj pro tio li estas ekzilita el sia patrolando en Rusujon. De 1889 ĝis 1895 li devis resti en Ustjujna, gubernio de Novgorod. En la jaro 1890 jam estis aperinta lia 70-paĝa Esperanto-lernolibro por litovoj, presita en la germana limurbo Tilsit. Reveninte el sia ekzilo, li fariĝis (1895-1907) profesoro de la Pastra Akademio de S. Peterburgo, dum kelka tempo li estis ankaŭ sekretario de la episkopo de Kaŭnas. Kiam en la jaro 1903 Pastro Emilio Peltier el Tours (Francujo) fondis la katolikan Esperanto-gazeton « Espero Katolika », Pastro Dombrovski fariĝis unu el ĝiaj plej bonaj kunlaborantoj, kaj jam la unua numero de E. K. enhavis lian poemon « Ĉesis jam viva malgajo publika... », dediĉita al Papo Pio X-a. Jam antaŭe lia bela preĝo « Laŭdu vi Dion, ĉiuj gentoj teraj, ĉiuj popoloj, laŭdu la Sinjoron!... » (verkita 1893) estis enpresita en la « Preĝareton por katolikoj » verkitan de la Markizo de Beaufront. 1907 Dambraŭskas fariĝis prezidanto de la katolika libroeldona societo de Sankta Kazimiro (kun preskaŭ sama programo kaj agadmaniero kiel « Maison de la Bonne Presse » en Francujo) kaj redaktoro aŭ kunredaktoro de diversaj jurnaloj kaj gazetoj. Tiel li redaktis la gazeton « Draŭgija », tiel li fondis la belan kaj nun ankoraŭ bonege prosperantan revuon de la katolika studenta movado en Litovujo « Ateitis » (« La Estonto »). Subskribante per sia alnomo A. Jakŝtas li eldonis diversajn verkojn pri teologio, scienco, politiko kaj poezio en lingvoj litova, pola, rusa kaj Esperanta. Ne parolante pri liaj multnombraj gazetartikoloj, li publikigis jenajn Esperanto-verkojn : « Lernolibro de Esperanto por Litovoj » (Tilsit 1890, du eldonoj), Versaĵareto (S. Peterburgo 1905), « Pri unu speco de kurbaj linioj » (Berlin 1905), « Pri novaj trigonometriaj sistemoj » (Berlin 1906), « Malgrandaj pensoj pri grandaj demandoj » (Kovno 1908), « Esperanto kiel scienca helpilo » (Kovno 1910). Krome vi trovas kelkajn el liaj verkajoj en la unuaj jaroj de « La Esperantisto » (eldonita de D-ro Zamenhof mem) kaj de « Espero Katolika » (eldonita de Pastro Peltier), en la « Fundamenta Krestomatio » de D-ro Zamenhof, en la « Litova Almanako » (Kaŭnas 1923) kaj komprenebl̂e en la gazeto « Litova Stelo », kiun li post la milito dum kelkaj jaroj eldonis kaj redaktis. Kiam 1920 Internacio Katolika (IKA) estas fondita, prelato Dombrovski fariĝis ĝia nacia direktoro por Litovujo, li kunlaboris je ĝia baldaŭ poste fondita organo « Katolika Mondo » kaj estis ĝis ĝia provizora ĉesigo ĝia kunredaktoro. Ke li ĉiam estis kaj estas amiko de nia MOKA-movado kaj de La Juna Batalanto, ni ja ne bezonas speciale klarigi. Prelato Dombrovski estas ankaŭ granda eminentulo en la ĝenerala Esperanto-movado, estante membro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio kaj prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio.



Ni katolikaj Esperantistoj dankas al Prelato Dombrovski speciale lian belegan verkon « Malgrandaj Pensoj pri Grandaj Demandoj », kiu vere estas multe pli, ol ĝia modesta titolo diras. Kaj oni povas kelkfoje fariĝi iom melamkolia, vidante, kiajn gravajn kaj sciencajn originalajn artikolojn li jam verkis antaŭ 25 jaroj, kaj komparante kun tio la primitivajn bagatelajojn kaj simplajn nesistemajn tradukajojn, kiujn produktas multaj katolikaj Esperantistoj de niaj tagoj. Li tiam kun varma, vaste malfermita koro kaj samtempe kun profunda scio veninta el senpera persona sperto en sia ruslanda agadejo kiel ankaŭ el preskaŭ nekompreneble vasta kono de la literaturo en ĉiuj kulturlingvoj pritraktis la problemon de la reunuigo de la kristanaro. Li verkis artikolon pri la « Transsubstanciĝo », kiu eble estas preskaŭ la sola serioze teologia originala verkajo ekzistanta en Esperanto, li ankaŭ en bonega maniero okupiĝis pri la « homaranismo », kies diskutado tiam estis iniciatita per artikoloserio de pseŭdonima sinjoro « Homarano » (sub kiu sin kaŝis D-ro Zamenhof mem)...

Mi nun volas fini la jam tro longan artikolon, kiu nur iomete povas montri la internacian signifon de nia kara Profesoro Dombrovski. Kion li signifas al sia litova popolo kaj ĝia katolika junularo, tion diros unu el liaj junaj samnacianoj mem. Li ankaŭ iom babilos pri lia nuna vivado kaj laborado. Krome en ĉi tiu numero ni kuraĝas republikigi honore al la jubileo kelkajn el la poemoj de Prelato Dambraŭskas. Ke ni en kelkaj la titolojn iom adaptis al niaj bezonoj, tion la aŭtoro bonvolu afable pardoni...

La junularo salutas pioniron de vasta kaj profunda katolika spirito, pioniron de la interkomprenigo de ĉiuj kristanoj, pioniron de la ideo de tutmonda paco kaj pioniron de la Esperanto-movado. Nia ĝojo, nia danko kaj niaj gratuloj flugu al li en tiun malgrandan landon Litovujon, kies fidela kaj amanta filo li estas, sed trans kies limoj lia rigardo kaj lia spirito enpenetras en la senfine vastajn, vere « katolikajn », t. e. universalajn realiĝfortojn, kiujn trablovas la pentekosta spirito kaj kiuj ekbrulas en la flamoj de ĝia sankta fajro...

**Wilhelm Solzbacher.**

---

# VIZITO ĈE PROFESORO PRELATO A. JAKŜTAS DAMBRAŬSKAS (DOMBROVSKI)

**De V. Kazlaŭskas.**

Mi aŭdis, ke profesoro prelato Jakŝtas Dambraŭskas ne ŝatas, ke iu venu al li pri bagatelaj aferoj, ĉar li ĉiam multege laboras. Tial mi nekuraĝe premis la sonorilon de lia loĝejo. Prelato Dambraŭskas loĝas ĉe la Rotuŝes-placo en Kaŭnas en la domo de la Societo de Sankta Kazimiro. Tie estas ankaŭ la librejo, kiun li mem ordigas, kaj la presejo de Ŝviesa (« Lumo »). Kaj en la sama domo loĝas profesoro Kuraitis, ĝenerala pastra gvidanto de la katolika studenta asocio « Ateitininkai » (« Estontuloj »)...

Mi eniris la laborĉambron de la prelato. La ĉambro estas ne granda, sed pura, bela, modesta, hela ; je la muroj estas bildoj : bildo de la Sankta Patro kaj kelkaj fotografajoj el lia pastra vivo. Sed la plej granda riĉajo estas la bele kunmetitaj libroj. Jen ankaŭ modesta horloĝo, kiu tiam montris 14.30 h., kvankam mia montris nur 11.30 h.,... ĉe la muro telefono.

Sur la tablo kuŝas libroj, — ili nur nun estas reportataj. Tiajn librojn prelato Dambraŭskas devas tralegi, trarigardi kaj diri, ĉu ili estas taŭgaj por librejo. Kiam mi demandis, kion li laboras, li respondas, ke li agadas en la Societo de Sankta Kazimiro (librofdonejo), sed ke li ankaŭ multe okupiĝas pri la scienco. Kaj li ekrigardis al la multaj kaj bele kunmetitaj libroj. Tiuj libroj plej bone rakontas, kion la prelato ŝatas. Plej multaj estas la teologiaj, natursciencaj, matematikaj kaj filozofiaj libroj. Precipe li posedas multajn valorajn matematikajn verkojn. Liaj libroj estas ĉiulingvaj. La prelato legas litovan, polan, rusan, latinan, germanan, francan kaj Esperantan lingvojn. Kaj li multe legas.

Prelato Dambraŭskas laboras en librejo, tamen trovas tempon, sekvi la novan sciencan literaturon. Ekzemple li kun bonvolo rakontas pri la nova verko de Denerto, en kiu estas skribate pri bildoj trovitaj en muroj devenintaj el tempoj antaŭ kelkaj miljaroj. Tiu sciencisto rakontas, ke ĉiuj infanoj ĉiam pentras similajn bildojn. Tio montras, ke eĉ antaŭ multaj miljaroj la homo montris la samajn kapablecojn de la kreado kiel hodiaŭ. Tio estas ankaŭ bato kontraŭ la darvinismo, diras la profesoro.

Kaj la prelato montras al mi kelkajn gazetojn sciencajn el malnovaj tempoj. Tiuj gazetoj ankoraŭ kontentiĝas pri rusaj tradukoj kaj rusaj malnovaj teorioj, kie estas neata la kristanismo, estas adorata la darvinismo kaj materialismo — en tiuj gazetoj jam paliĝintaj.

Multaj jaroj ne faris la prelaton pli maljuna, ne faris lian animon pli maljuna. Kaj jen prelato Dambraŭskas ne volas multe rakonti pri sia vivado, sed pri literaturo kaj pri libroj li rakontis multe kaj kun fajro en la okuloj.

Kion Via Prelata Moŝto opinias pri nia litova literaturo? — Oni ne povas tre ĝoji pri ĝi : La originala literaturo estas ne forta, multaj tradukitaj verkoj estas malbonaj. Preskaŭ ĉiuj verkistoj nur penas plaĉi al la publiko, sed ĉu ilia verkado estas utila al la leganto, pri tio ili tute ne zorgas. Ili tradukas librojn kun sensacia enhavo, pri banditoj, krimuloj kaj malsanecaj fantaziaj novajoj (li citis la nomon de Monte-Kristo). Se ni donas al nia junularo tian literaturon, ni kompreneble ricevos nur malsanajn fantaziemulojn kaj sensaciserĉantojn. Mi legas — diras la profesoro — librojn en fremdaj lingvoj kaj miras, kial neniu tradukas klasikajn verkojn, en kiuj estas vera arto...

Li sekvas ĉiujn novajojn de la scienco kaj literaturo, tial li multege laboras. Li leviĝas je la sesa horo matene kaj laboras la tutan tagon. Pli frue li iris promeni, precipe ofte ni povis vidi lin kun nia ĉefepiskopo Karevičius de Kaŭnas, nun estas vintro kaj la malvarmo ne lasas lin eliri el la domo. Prelato Dambraŭskas tre multe okupiĝas pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Al li tiu internacia lingvo estas tre kara. Li eldonis la Esperanto-gazeton « Litova Stelo » kaj estis ĝia redaktoro. Sed nun liaj kunlaborantoj estas disjetitaj, li mem estas tre okupita kaj laboras aliajn laborojn. Li treege bedaŭras, ke litovaj studentoj ne volas aŭ ne povas reorganizi la katolikan Esperanto-societon, de kiu ankoraŭ nun ekzistas malgranda biblioteko. Kaj tamen tio estus necesa! La profesoro kredas, ke iam la tuta Eŭropo devos havi unu internacian lingvon. Tion nepre bezonas la homoj. Lerni kvin aŭ ses lingvojn, estas malfacile, kaj tiu forto, kiu estas necesa al la lernado de multaj lingvoj, povus esti pli utile uzata por alia intelekta laboro. Kvankam la profesoro mem perfekte scias ses lingvojn, krome ankoraŭ uzas grekan lingvon kaj latvan lingvon, li opinias, ke iam devos sufiĉi tri lingvoj : gepatra lingvo, ŝtata lingvo kaj internacia lingvo. La lingvo estas granda kaj potenca interligilo, tialtiam, kiam estos uzata unu internacia lingvo, estos malpli multaj disputoj inter la homoj. Precipe tia internacia lingvo estas grava al la malgrandaj popoloj. Kaj ni litovoj tiam bezonus malpli multe plendi, ke nia literaturo estas malriĉa, ke ni ne havas bonajn librojn en nia lingvo. Ankaŭ ni tiam povus eldoni niajn plej bonajn artikolojn en internacia lingvo, kaj ili atingus la tutan mondon!



Tiu lingvo povas esti nur Esperanto. Kontraŭ tiu lingvo ankaŭ la katolikoj havus nenian riproĉon, ĉar ĉiuj katolikoj estas unu familio, la familio de la Eklezio, kaj la patrino Eklezio tre ĝojos, ke ŝiaj infanoj povos iam pli bone kunlabori. La hebreoj ankaŭ lernos Esperanton, ĉar la aŭtoro de Esperanto estis hebreo. Mi ĝian venkon en mia vivo ne plu atendas, diras prelato Dambraŭskas, sed vi, la junularo, vidos, ke tio devas esti!...

Ho, kiom Dambraŭskas iam amis la litovan junularon! Li dediĉis al ĝi la de li fondi'tan jurnalon « Ateitis » (« La estonto »). Kaj nun ankoraŭ li amas ĝin. Kaj nun li bedaŭras, ke la junularo kelkfoje ne funkciis. Li kredis, ke la junularo estas honesta, kaj atendis de ĝi seriozajn sciencajn gelaborantojn. Li mem estas plej diligenta, tial li rakontas, ke nia junularo ne montras sufiĉe grandan aktivecon en la scienco. Ni devas ne nur kontentiĝi pri la malvastaj kadroj de nia propra lando, ni devas scii la tutan kaj tutmondan sciencon.

Ni deziras, ke nia diligenta kaj aktiva verkisto restos sana kaj ankoraŭ vivos multajn jarojn. Kaj ni, la junularo, akceptas de la unua redaktoro de nia litova katolika junulara gazeto « Ateitis » la ekzemplon de la diligenteco, simpleco, religiemo, honesteco, amo al la patrolando, scienco kiel bildon de la amo!

Trad. el litova lingvo **Martinas Štonis.**

---

# Mondjunularo Katolika (Moka)

**estiĝinta kiel movado el la uragano de la mondmilito, definitive fondita en Hago 1928, disvastigita tra la tuta mondo, benita de la Sankta Patro, subtenita de sia alta protektoro Msgr. D-ro G. K. grafo Majlath, episkopo de Transilvanio en Alba Julia (Rumanujo), kaj de proksimume 30 episkopoj diverslandaj,**

## LABORAS

**en daŭraj amikaj rilatoj kun internaciaj kaj naciaj katolikaj organizajoj kaj en forta kunlaboro de siaj delegitoj, grupoj, membroj kaj korespondantoj en ĉiuj partoj de la mondo, ankaŭ en la plej malproksimaj transmaraj landoj, sub la gvido de Internacia Komitato kaj Ekzekutiva Komitato**

## POR LA KATOLIKA PACA IDEO,

**disvastigante la ĉiamajn katolikajn principojn de la homa kunvivado, kreante per personaj internaciaj rilatoj fortan senton de tutmonda solidareco, starigante praktikajn instituciojn tiucelajn, propagandante internacian helplingvon kaj praktike enkondukante Esperanton en la internacian katolikan junularan agadon.**

## LA JUNA BATALANTO

**estas la voko de juna katolika generacio ĉiulanda al ĉiuj fratoj kaj fratinoj en la vasta mondo kaj al ĉiuj katolikoj, kiuj kun maldorma spirito kaj kun varma, malfermita koro staras en la tempo. Ĉi tiun gazeton vi devas legadi kaj aboni, ĉar**

## TIUN VOKON VI DEVAS AŬDI !

# El la Poemoj de Prof. Prel. A. Dombrovski

## AL LA PAPO.

Ĉesis jam viva malgajo publika,
Dio ĝojigis la Kristeklezion :
Ĉe trono Petra la mond' katolika
Salutas Pion.

Grincu per dentoj infera serpento !
Nin ne timigas jam via envio :
Tra l' maraj ondoj kaj forta la vento
Nin gvidos Pio !...

Oni diradu, ke Petra la Ŝtono
Jam detruiĝas, fariĝas nenio...
Granda mensogo! Jen sankta la trono
Kaj sur ĝi Pio !...

Tial laboru sen tim', kristanaro,
Ĝis kiam estos, laŭ vorto de Dio,
Unu paŝtanto kaj unu ŝafaro...
Gvidu ĝin Pio...

## HOMA INDECO.

Al mi skribis el Manilo
Iu : Vivu la Rusland' !
Vivu krista religio,
Vivu blankarasa grand' !

Ho amiko, bonan koron,
Noblajn sentojn havas vi ;
Bedaŭrinde vi forgesis,
Kio estas religi'.

Vi forgesis, ke laŭ Kristo
Homo estas Diimag'
Ne per sia blanka haŭto,
Sed per krea vort' kaj ag'.

Vi forgesis, ke ŝatinda
Por Di' estas nur anim',
Ke blankiĝas ĝin nur virto,
Ke nigrigas ĝin nur krim' !...

## ESPERANTO.

Dank' al Dio sonas mia kanto,
Dank' al voĉo mi ne estas muta,
Sed dank' al la bela Esperanto
Mi parolas kun la mondo tuta.

Anglo, franco, ruso, polo, svedo,
Dano, sviso, belgo kaj hungaro
Min komprenas sen tradukrimedo,
Parolantan al ĉiuhomaro.

Jes, ĉu hejme, ĉu en eksterlando,
Ĉie fratojn mi jam multajn trovas ;
Ĉar solviĝis monda la demando,
Homo homon ekkompreni povas.

## LITOVA POPOLKANTO, TRADUKITA DE A. DOMBROVSKI.

Ĉe tabl' ni sidas,
Kaj tra l' fenestro
Rigardas, aŭdas :
La maro bruas.

Profundaakva
Estas la maro.
Tie elkreskis
Verda acero.

Sub la acero
Tiu centbranĉa
Staris du junaj
Tie fratinoj.

Tij starante.
Malgajplorante,
Al si parolis,
Penson pensadis.

Per ki' ni lavos
Blankajn vizaĝojn ?
Per ki' ni kombos
Flavajn harligojn ?

Ni per marŝaŭmo
Vizaĝojn lavos,
Per la marperĉo
Ni harojn kombos.



# Hinduismo kaj Katolikismo

De D-ro H. C. E. Zacharias.

Hindujo prezentas ekstrakton de la tuta homaro; ĉiu fazo de la homa evoluo, plej bona kaj plej malbona, plej bela kaj plej malbela, tie trovis hejmon kaj azilon. Hindaj problemoj estas homaraj problemoj, kaj iliaj efikoj ne restas starantaj antaŭ iu limo de Hindujo aŭ Eŭropo, sed en siaj efikoj al Hindujo mem kiel eĉ al ĉiuj aliaj kontinentoj ĝis la plej malproksima Oceanio kaj Afriko estas enplektitaj en la mondteksajon. Tamen Hindujo por la eŭropa publiko ĉiam ankoraŭ estas nekonata lando. Rilate mian propran konon de Hindujo : la eksteraj, kvankam iom neordinaraj ĉirkonstancoj de mia vivado en Hindujo kaŭzis, ke mi per plej persona kunvivado povis identigi min kun la bramana supra klaso de Hindujo en tia maniero, kiel estis eble nur al tre malmultaj eŭropanoj. Ĉar mia politika sinteno kaj jurnalista agado min, la laikon, kunkondukis kun samideanaj hindoj kaj baldaŭ instigis min, tute aliĝi al societo, kiu grandanime kaj sindone klopodas por la politika kaj socia renovigo de sia granda hinda hejmolando — al la « Societo de la Servantoj de Hindujo », al kiu aparteni kiel eksterordinara membro mi ankoraŭ nun havas la honoron.

Tiu societo estas bazita sur la amo al la patrolando, sed ne ŝoviniste troigita, sed ankoraŭ — ĉu konscie ĉu nekonscie — penetrita per la spirito de la natura religio entenita en la hinduismo kaj penanta realigi siajn idealojn de la justeco kaj libereco, de la popola solidareco kaj memrespondeco, per laŭkonstituciaj iloj. Kunlabori je tiu tasko, estis al mi granda ĝojo dum multaj jaroj — en kunlaborado, kiu min ne nur kunordigis, sed ankaŭ subordigis : grava faktoro por vere kolegaj kaj intime-amikaj rilatoj, kiuj nur tiel fariĝis eblaj al mi kun la gvidantaj personoj, hindaj politikistoj, sociaj reformistoj verkistoj — kaj eĉ tie nur, ĉar mi dediĉis min al mia tasko ne kun kaŝitaj krompensoj, sed tute pro la afero mem. En tiuj rondoj do mi dum longaj jaroj ne nur agadis, sed vivadis; tio estis la familioj, malfermitaj al mi, tio estis la amikoj, kun kiuj mi interrilatis, tio estis la socio, kies parto mi estis fariĝinta, kies vestojn mi portis, kies manĝojn mi manĝis, kies kutimojn kaj kulturon mi estis farinta miaj, komprenebIe neniam malkonfesante mian kristanismon aŭ kontentigante, esti « varmeta » katoliko. Ĉi tiun vidpunkton honoris la aliaj, kies plej multaj estis agnostikuloj, kelkaj eĉ ateistoj; la temo de la religio neniam iĝis disputa aŭ eĉ nur diskuta objekto; kiam oni volis ion scii pri iu punkto de nia religio, mi donis la informon, sed mi neniam komencis. Sed mi ĉiam antaŭenmetis la principojn de nia katolika filozofio, defendis niajn politikajn kaj ekonomiajn solvojn kontraŭ liberalismo kaj socialismo kiel solaj solvoj de la problemoj, kaj mi sukcesis. Ĉar tiu katolika ŝtata kaj ekonomia doktrino estis ankoraŭ nekonata en Hindujo, kaj oni dankis min, ĉar mi tiujn ideojn — sur la bazo de la natura justeco kaj de la natura religio — konigis al hindaj politikaj rondoj, precipe ĉar ĝuste tiu nia koncepto grandparte koincidas sur tiuj publikjuraj kampoj kun la malnova tradicio de la hinduismo.

Mi parolis pri mi mem, ĉar mi devis montri, sub kiu vidangulo mi ekkonis Hindujon kaj kial tiu koincidas kun tiu de klera hindo; sed ties interpretanto mi deziras esti, por kapabligi la leganton, mem juĝi pri la problemo de praktika renkontiĝo inter hinduismo kaj katolikismo.

Tiu renkontiĝo ja devas eliri de la teoriaj bazoj: la principoj, sur kiuj la hindua religio kaj filozofio staras, devas esti ekzamenataj kaj pruvataj kiel falsaj aŭ rekonataj kiel ĝustaj — kaj tial katolikaj — veroj. Tia renkontiĝa diskutado ofte okazis, plej ofte en batalema formo, kiu nur malutilis al la disvastigo de la kristanismo, sed en plej nova tempo ankaŭ en modela formo de vera komprenemo kaj varma simpatio al la hinduis-

mo. La vivlaboro de du grandaj jesuitoj ĉi tie devas esti citata, de la teologiisto Georges Dandoy kaj de la filozofiisto P. Johanns, kiuj ankaŭ kune eldonas en Calcutta monatan revuon « The Light of the East » (« La Lumo de la Oriento »):

Sed tia teoria diskutado ne sufiĉas; ne estas tiel, kvazaŭ ĉiu unuopa hindo kun senpartia trankvileco kaj logika malvarmeco reekzamenus la gustecon de siaj hinduismaj ideoj en la lumo de tiu kritiko kaj, tuj kiam li estos konvinkita pri ilia vereco, venus al la konsekvenco de la bapto. La homo ja ĝenerale estas pli sentema ol intelekta homo; li plejgrandparte reagas instinkte kaj el sia subkonscio kaj tre ofte fiuzas sian intelekton, por poste elcerbumi bele sonantajn justigojn por sia agado. La plej brilaj diopruvoj malofte sukcesis konverti ateiston; sed ofte malsano, karita ago, kiuj havis nenian senperan rilaton al la kritiko de la ateismo, estis la kaŭzoj, ke la nekredanto estas rekondukita al la vero. Plue estas grave, ke la homo estas ne nur individuo, sed ankaŭ membro de homa socio kaj kiel tia guste en tiu kampo sentas kolektive.

Sed kio alia do estas hinduismo ol « hindeco »? « Hinduismo » estas malfacile difinebla: ĝi entenas ĉion tradician en la vivo de la hindaj popoloj, kutimojn, leĝojn, kulturon, religion. Se oni do postulas de hinduo, ke li malkonfesu sian hinduismon, tio signifas por li instinkte, ke li ĉesu esti hindo kaj ke li fariĝu kvazaŭa anglo. Intelekte la hindo povas bone justigi tiun instinkton per la ekzemplo de la hindaj kristanoj, kiuj tre ofte estas sennaciiĝitaj, en siaj kutimoj sklave imitas Eŭropon kaj — kio nuntempe estas speciale grava — volonte donis kaj donas helpon al la fremdula regado. Hindo konvertiĝanta al la kristanismo tial aperas al la hinduo kvazaŭ sennaciulo, perfidulo je sia lando, sentradicia homo malkonfesanta siajn patrojn kaj siajn samnacianojn pro ia profito. Ke la plej malsupraj klasoj, la subpremitoj kaj elpuŝitoj, aŭ eble la sovaĝaj montogentoj, kiuj ankoraŭ staras ekster la hinda kulturo, kristaniĝas, tion eble la klera hinduo komprenas, — sed li mem? Neniam!

Tial la sukcesoj de la misio limiĝas preskaŭ ekskluzive al la malsupraj klasoj de la hinda socio, ekz. al la konverto de Chota Nagpur, kie dum duona jarcento kvaronmiliono el tia praloĝantaro estas kondukita al la katolikismo per belgaj jesuitoj. En la provinco Madras, kie vivas triono de ĉiuj kristanoj de Hindujo, en laboro de jarcentoj depost la komenco de la Madura misio la Katolika Eklezio forte enradikiĝis; sed eĉ tie la kristanoj estas nur tri procentoj de la tuta loĝantaro, kaj krome tiu eklezio konsistas precipe el membroj de la Sudra, t. e. la nearja raso, kiuj ne malofte kristaniĝis pro kontrasto kontraŭ la bramanoj, simile kiel en Norda Hindujo tiaj kontrastoj helpis la enpenetron de la mahometanismo. Krome la Eklezio ĉie ricevas anojn el la rondoj de la pariaoj, kiuj staras ekster la socio kaj kies socia subpremiteco estas unu el la plej bedaŭrindaj fenomenoj de Hindujo. La verdire « bona socio » de Hindujo, la klera bramana supra klaso, ankoraŭ ĉiam estas preskaŭ absolute fermita al nia misiisto; nur la junuloj el tiuj klasoj ekrilatas al li, dum kiam ili vizitadas katolikajn lernejojn kaj universitatajn kolegiojn. Tiu kontakto komprenebie estas plej signifa: ĉar ĝi ebligas, iom post iom detrui malnovajn antaŭjuĝojn kontraŭ la katoliko, se ne kontraŭ la katolikismo, kaj, kvankam eble nur nedirekte, doni al junularo alie senbrida disciplinon, aŭtoritatsenton kaj fortajn moralajn valorojn.

(Daŭrigota).

EN HINUJO MOKA jam havas membrojn kaj kunlaborantojn en ses provincoj, tazian ekzekutivan komitaton kaj bonan naciilngvan gazeton kun Esperanto-parto. Kial en via lando tio ne estas ebla?



# Letero de Juna Japana Katoliko

al la redaktoro de LA JUNA BATALANTO.

« ...Mia domo, mia familio estas budhista, sed antaŭ proksimume unu jaro mi sola, dank' al Dio, fariĝis katolika, estas baptita en la pentekosta festo de 1929 kaj ricevis la kristanan nomon Johano Mario...

Antaŭ nelonga tempo ni ricevis en Japanujo novan Grandan Seminarion de Sankta Francisko Ksaverio en Tokio, por ĝi oni festis grandan karitan koncerton sub la protekto de la belga ambasadoro Barono de Bassompierre. Ĉeestis i. a. la nevinoj de la eks-ĉefministro, S-ro Takohasi reprezentanta la japanan Kortegon, la filino de Bassompierre.

La nombro de la katolikoj en Japanujo ne estas tre granda, sed nia malgranda movado certe baldaŭ donos fruktojn. Sed ni, la japanaj katolikoj, estas inter du fajroj, ekstrema dekstro kaj ekstrema maldekstro.

En Japanujo nun estas en modo la teorio de la marksismo. Senkritike kiel en aliaj landoj la studentoj kuras al tiu teorio. Kaj je la alia flanko la budhistoj komencas novan propagandon inter ili. Kaj estas ankoraŭ aldone, ke el Ameriko ĉiuj specoj de modernismoj kaj plej diversaj doktrinoj enpenetras, ekz. per la filmoj.

Kaj krome, kiel vi scias, la katolikoj en nia lando havas antaŭ si la grandan problemon de la ŝintoismo...

Sed en aliaj leteroj mi esperas skribi pluajn detalojn pri pli malfacilaj kaj interesaj problemoj... »

**Juan Maria Hashimoto**, Tokio.

# BOLŜEVISMO KAJ EKONOMIA REVOLUCIO

De Sigrid Undset.

Eble hodiaŭ en Eŭropo ekzistas ne multaj homoj, kiuj ne kredas, ke ni staras senpere antaŭ radikala ŝanĝo de la ekonomia organizo de la publika mastrumado. Mi opinias, ke estas treege verŝajne, ke la soveta principo en unu aŭ alia formo venkos. En la nuna momento certe neniu politika grupo kaj neniu individua homo estas kapabla, gajni eĉ nur proksimume superrigardon pri la rusa revolucio kaj ekkoni, en kiu proporcio ĝi estis portata de fortoj ŝtatrenoviga j aŭ ŝtatdetruaj. Pri unu afero mi estas konvinkita: La tedo kontraŭ la bolŝevismo estas io alia kaj pli ol nur timo de la posedantaj klasoj, ke oni rabos iliajn potencon kaj materiajn bonojn, kaj la dolora timo de la kulturhomo, ke li devos vidi, kiel spiritaj kaj materiaj belaĵovaloroj estos detruataj de barbaraj bandoj. En tiu timo ankoraŭ troviĝas la pramalnova sento de la demoneco, kiun la eŭropano sentas al la oriento. Jam la bildoj de la gvidantoj de la rusa revolucio, kiujn la gazetoj publikigas — ĉiuj tiuj viroj kun semidaj kaj tataraj vizaĝoj kaj fantaziaj nomoj, povas timigi...

Ne estas troigo, se oni diras, ke la homoj okcidente de la rusaj limoj sciis tre malmulte pri Rusujo. En la popola buŝo ĝi ja simple nomiĝis Duon-Azio. La okazajoj de la lastaj tempoj sendube efikos, ke Okcidenta kaj Orienta Eŭropo pli multe vidos unu la alian. Kiun utilon ni povos tiri el tiu konatiĝo, certe dependas de tio, kiugrade ni montros nin kapablaj, kompreni la rusojn. Ĉu la projekto de la rusa revolucio por soveta ŝtato estas taŭga bazo por la laborplanoj al novkonstruo de la publika organizo, tio, mi kredas, ne dependos de tio, kion ni povas ekscii pri la vera

evoluo de la revolucia teruro; ĉar ĉiu homo povas diri al si mem, ke revolucio, de kiaj ajn altaj kaj sanaj idealoj ĝi estas portata, en certa momento ĉiam donas vastan agadejon al la plej malbonaj elementoj de socio kaj al la plej malbelaj instinktoj de la ordinara homo. La respondo ankaŭ ne povas dependi de tio, kiel la eksperimentoj de la rusa revolucio, por realigi siajn projektojn pri administrado de socialista ekonomio, efikis ĝis nun al la produktado, — estus malĝuste atendi, ke popolo post kvin jaroj da milito kaj revolucio estus bonfarta kaj havus prosperantan nutradsistemon. Kiugrade la rusa revolucio estis portata de ideoj aŭ naskis ideojn, kiujn la aliaj eŭropaj nacioj povas akcepti kaj digesti kaj kiuj estas utilaj por ili, tio antaŭ ĉio dependas de tio, kiugrade la nomo Duon-Azio estas trafa aŭ ne — ĉu oni ekkonos, al kiu do Rusujo estas pli simila : al ni aŭ al la orientaj landoj.

Kion ajn nun certa tipo de homoj, kiuj nomas sin mem patentburĝaj, kiuj tamen tute ne estas mia idealo de burĝeco, opinias pri la rajtigita aŭ nerajtigita malkontenteco de la laboristaj amasoj, tio tamen nenion ŝanĝas je la fakto, ke tiuj amasoj estas tre malkontentaj kaj ke ili apenaŭ pli frue kvietiĝos, ol kiam ili estos vidintaj, ke laŭ **ilia** iniciato realiĝis gravaj ŝanĝoj ĉu plibonigantaj ĉu plimalbonigantaj la staton.

Se oni kulpigas nian tempon, ke ĝi estas pli ol aliaj epokoj tempo de la monĉaso, tio estas prava. En tiu senco oni eĉ povas diri, ke la industriismo estis malamika ne nur al la privata iniciato, sed ankaŭ al la privata posedrajto, ĉar ĝi efikis, ke la privata iniciato de malmultaj homoj paralizis la privatan iniciaton de sennombraj aliaj kaj ke ĉe la malmultaj amasiĝis neproporcie granda privata kapitalo, dum ke la grandaj amasoj de la homoj posedas nenian privatan kapitalon. **Unu** vojo al la regulado de tiu stato eble kondukas tra pli aŭ malpli efektivigata komunismo. Privata iniciato kaj privata posedo ne povas esti detruataj; la komunismo povas maksimume disrompi la grandajn amasiĝojn kaj denove vivigi iniciaton kaj posedsenton ĉe la ordinaraj homoj.

Kompreneble la granda solida amaso de la virinoj ĉiam havas la intereson, ke socia transformiĝo okazu kiom eble plej nerimarkite kaj laŭgrade. La konservativismo apartenas al la naturo de tiuj, kies natura tasko estas, konservi la novajn vivojn kaj doni al ili hodiaŭ ankoraŭ la samajn instruojn kiel iam en la ŝtonperiodo, krei vojon al la interrilatbezono de la infano, metante en ĝian buŝon la lingvan vorton, kaj forteni ĝin de la fajro, tute egale, ĉu ĝi brulas en groto kiel en praantikvaj epokoj aŭ ĉu ĝi estas, kiel hodiaŭ, enfermita en alumetujon.

La speciala intereso kaj la speciala tasko de la virinoj en revoluciaj tempoj estas, atenti, ke la homoj ne forgesu: oni povas ribeli kontraŭ la socia ordo kaj plibonigi la sociajn malbonstatojn, sed oni ne povas plibonigi la elementojn, el kiuj la publiko konsistas, kaj ne la faktorojn, el kiuj la malbonstatoj estiĝas — la homojn kaj ilian naturan kvaliton. Guste la virinoj estas tiuj, tra kies manoj iras la freŝa krudmaterialo kaj kiuj povas konstati, ke ĝi ne ŝanĝiĝis de historiaj tempoj.

(El artikolo « La eterna virina problemo » en la katolika gazeto « **Hochland** », junio 1930.)

---

**ABONU nian gazeton, sendante 2.— RM aŭ egalvaloron al la eldonejo! Ne prokrastu ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ !**



# La Katolika Paca Movado en la Landoj de la Mondo

Ni daŭrigas nian artikoloserion, kiun ni komencis en la lasta numero per raporto pri Anglujo, publikigante artikolon pri amerika katolika paca movado. RED.

## LA KATOLIKA ASOCIO POR INTERNACIA PACO EN USONO.

De Pastro Prof. D-ro Francis J. *Haas*, prezidanto de la Catholic Association for International Peace.

Antaŭ ol doni mallongan raporton pri la Katolika Asocio por Internacia Paco, estus bone, se la loko tion permesus, montri la gloran tradicion de la Eklezio rilate la pacon inter la nacioj. La Dia Paco (Treuga Dei), la packontraktoj de la Mezepoko, la jesuito Suarez kaj la dominikano Vitoria, la klopodoj de Pio X-a kaj Benedikto XV-a, por eviti kaj finigi la mondmiliton, la agado de Pio XI-a, ĉio tio estas parto de pentrinda historio, el kiu estiĝis ne nur la Katolika Asocio por Internacia Paco en Usono, sed ankaŭ similaj organizaĵoj en Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Anglujo, Francujo, Germanujo, Nederlando, Polujo, Svisujo, Hinujo kaj Brazilio.

La Katolika Asocio por Internacia Paco estiĝis kiel rezulto de kunvenoserioj en la jaroj 1926-27. La iniciato estas prenita tuj post la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Chicago (Junio 1926), kie reprezentantoj de dekduo da nacioj kunvenis kun amerikanoj por neformala diskutado. Dua kunveno sekvis en oktobro samjara en Cleveland, kaj oni fondis provizoran « Katolikan Komitaton por Internaciaj Rilatoj ». En aprilo 1927, en dutaga konferenco okazinta en Washington, la definitiva nomo « The Catholic Association for International Peace » estas akceptita. Tri jarkunvenoj poste estas okazigitaj en Washington, la lasta 22-23 aprilo 1930

La Asocio laboras per preparado de komitataj raportoj. Post zorga preparo ili estas diskutataj publike kaj private, por revizii ilin, kaj poste la organizaĵo ilin publikigas. Ĝis nun kvin raportoj estas publikigitaj : « Internacia Etiko », « Latin-Ameriko kaj Usono », « Kaŭzoj de militoj » « Sendanĝereco en malnovaj kaj novaj tempoj ». « La Ligo de Nacioj ». Sesa raporto, pri «Amerika agrikulturo kaj internaciaj rilatoj » estas aperanta en serioj en la gazeto « Central-Blatt and Social Justice ». Ankaŭ aliaj raportoj baldaŭ sekvos : « Leĝo kaj Organizo », « Ekonomiaj Rilatoj », « Paca Eduko », « La Rasa Problemo », « La Kolonioj », « Azio ».

Krom la publikigo de raportoj pri problemoj de internacia graveco la Asocio serĉas la membrecon de katolikoj interesitaj en la paca movado, eldonas monatan bultenon « International Relations News Letter » por helpo en lernejoj, studkluboj ktp., peras materialon pri internaciaj problemoj, preparas kaj disdonas bibliografiojn kaj studplanojn por studrondoj kaj debataj societoj en katolikaj kolegioj, kaj ĝi kunlaboras kun eksterlandaj pacgrupoj kaj kun kelkaj pacsocietoj en Usono. Ĝi nun i. a. intencas organizi internaciajn klubojn kaj konkursojn en artikoloj pri pacaj problemoj en altlernejoj kaj kolegioj.

Realigante sian programon, la Asocio klopodas studi, disvastigi kaj apliki la principojn de la natura juro kaj de la kristana karito al la internaciaj problemoj de la tago, konsideri la moralan kaj leĝan aspektojn de ĉiuj agoj, kiuj estas pro-

ponataj aŭ defendataj en la internacia sfero, ekzameni kaj studi faktojn rilate internacian bonvolon, kaj akceli en harmonio kun la instruo de la Eklezio la internacian pacon kaj tutmondan bonfarton.

La Katolika Asocio por Internacia Paco venas en tempo, kiu treege bezonas ĝin. La internacia pozicio de Usono estas plifortigita. En sama mezuro niaj eblecoj kaj devoj estas pligrandiĝintaj. Kiel ŝtatanoj de demokratio kaj kiel katolikoj ni devas zorgi, ke tiom, kiom ni povas, nia ŝtataneco estu uzata, por porti justecon, amon kaj pacon inter la naciojn de la tero. La Asocio deziras fari sian parton, por helpi la Unuiĝitajn Ŝtatojn de Ameriko kaj speciale la katolikojn, koni kaj eluzi tiujn devojn kaj eblecojn. Kaj ĝi volas esti utila al katolikaj organizaĵoj en ilia agado por realigi « la Pacon de Kristo en la Regno de Kristo. »

---

**VI BOJKOTAS la laboron de junaj homoj, kiuj fordonas multe da tempo kaj mono por nia gazeto, se vi ne regule pagas vian abonkotizon. Ne atendu specialan admonon, sed pagu tuj!**

---

# SPEGULO DE LA KULTURO

### Li ne volis mensogi...

« Echo de Paris » raportas, ke la **ĉefo de la rusaj mahometanoj** estas oficiale petita klarigi, ke la islamo estas neniel persekutata en Rusujo. La 75-jara Mufti rifuzis tion, dirante, ke li en sia tuta vivo neniam mensogis. Kaj oni arestis kaj malliberigis lin en Moskva...

### Prezidanto Masaryk al la infanoj.

La prezidanto de la Ĉeĥoslovaka Respubliko festis sian 80-an naskiĝofeston. Al grupoj da infanoj alportantaj al li gratulojn li faris jenan paroladon **en ĉeĥa, slovaka, germana, ukrajna, kaj hungara lingvoj** : « Mi deziras al vi antaŭ ĉio sanecon. La homo havas la devon, esti sana, nur tiel li povas helpi aliajn kaj ne faros al ili penon. Konservu puraj vian korpon kaj viajn loĝejojn! Praktiku sporton kaj ne timu aeron, akvon kaj sunon! Helpu la proksimulon, deziru al ĉiu nur bonon. Ni havas en nia lando kelkajn naciecojn, kaj ĉiu devas ami sian lingvon kaj sian popolon. Sed en tio li devas klopodi alproksimiĝi al la alia kaj kompreni la alian. **Lernu la lingvon de la najbaro, restu sanaj kaj fariĝu honestaj homoj!** Mi ne scias, kion alian mi ankoraŭ povus deziri al vi. Iru kun Dio! »

Laŭ « Allgemeine Rundschau », München.

### Laboro kaj armiloj en Soveta Rusujo.

Oni sciigas el Warszawa, ke laŭ la jurnalo « Kurier Warszawski » la Plejalta Konsilantaro de la Sovetoj decidis, ke la salajro de la laboristoj, kiuj laboris la Paskotagon, estu uzata por la konstruo de tankoj kaj aeroplanoj. Tio estu « inda respondo al la Letero de la Papo ».

Bonege. Tiel la rusaj laboristoj lernos du aferojn : ke, kiam oni laboras en festotago, tio ne estas pagata; kaj ke, se oni pro malestimo al la papo fabrikas armilojn, la Papo devas esti vere Patro de la Paco.

Laŭ « Osservatore Romano », Vatikano.

### Malbonaj legaĵoj kaj krimoj.

La sorto de la dekkvinjara knabino, kiu antaŭ nelonge en North Bay mortigis sian patrinon, montras al ni ekzemplon de la tragikaj sekvoj, kiujn povas havi la malbonaj legaĵoj, speciale por gejunuloj. Havante



temperamenton facile inciteblan kaj malsaneman korpan konstitucion, la knabino laŭ la juĝeja atesto de sia patro serĉadis la fortajn emociojn, antaŭ ĉio per fervorega legado de kriminalaventuroj kaj aventuraj romanoj. Kaj la malfeliĉa viro ne hezitis eĉ nur unu momenton por kulpigi tiun literaturon, kiu estis la unua kaŭzo de la tragedio, kiun trairis lia familio.

Antaŭ la juĝisto la junulino mem klarigis, ke ŝi sentis sin puŝita al la freneza ago, ĉar la patrino estis malpermesinta al ŝi, iri sola al promenado kun junulo. Ne povante toleri tian malpermeson, ŝi kun plena trankvilo mortpikis la patrinon kaj poste kviete foriris al sia rendevuo, konvinkita, ke la amo al tiu junulo plene justigas ŝian krimon.

Tiuj du klarigoj estas en perfekta konekto inter si. La legado de certaj libroj estis falsiginta kaj transforminta la impreseblan senton de la dekkvinjarulino ĝis tia grado, ke ŝi kredis, ke la amo justigas ĉion, eĉ la patrinomortigon! De la legado al la krimo : la konsekvenco estas tre logika. Ne povas esti alie.

Laŭ « Osservatore Romano », Vatikano.

### Pri plakatgluaĵo, kaprinoj kaj diplomata konflikto.

Ke la gluaĵumado de la cerboj povas konduki al militoj, tio estas konata fakto. Sed kiu kredus, ke la diferencoj en la kvalito de franca kaj hispana plakatgluaĵo eĉ en sufiĉe nova tempo preskaŭ estus kaŭzintaj gravan diplomatan konflikton? Francaj koloniistoj kaj komercistoj en Maroko konstatis unu tagon, ke iliaj anoncoj kaj plakatoj ĉe la pordegoj de la urbo Tanger daŭre estis dispeciĝitaj kaj difektitaj, dum ke la hispanaj plakatoj restis sendifektaj. Rigardante la nesolveblecon de la problemo, la diplomatoj jam komencis serioze okupiĝi pri ĝi, kiam la kompetenta kaprinopaŝtisto solvis la enigmon. Liaj kaprinoj, kiuj ĉiumatene kunvenis ĉe la pordegoj de Tanger, estis treege ŝatintaj la francan plakatgluaĵon, dum ke la hispana gluaĵo tute ne plaĉis al ili...... Estas la demando, ĉu en ĉiuj tiaj aŭ similaj kazoj saĝaj kaprinopaŝtistoj helpos la saĝajn sinjorojn diplomatojn.

Laŭ « Erwachende Jugend », germanlingva MOKA-gazeto.

### Pri sep homoj kaj unu dikhaŭtulo.

Mi konas socian ekonomiiston; al tiu la ekkono de la fakto, ke ni ĉiujare elspezas 15 milliardojn por alkoholaj trinkaĵoj kaj almenaŭ same multe da mono por ĉiujaraj sekvoj de la alkoholmisuzo, faris tiom da zorgoj, ke li fariĝis abstinenca.

Mi konas kuraciston, kiu vidis, ke la alkoholismo estas unu el la plej teruraj fontoj de la degenerado kaj de la malsanoj. Tio impresis lian konsciencon tiom, ke li fariĝis abstinenca.

Mi konas juriston, kiun la fakto, ke ĉiujare sole en Germanujo 200 000 homoj venas antaŭ la kriminaljuĝiston sekve de la alkoholismo, tiom impresis, ke li fariĝis abstinenca.

Mi konas pastron, kiun la malpleneco de lia preĝejo kaj la pleneco de la drinkejoj tiom meditigis, ke li fariĝis abstinenca.

Mi konas altan oficiron, kiun la malĝojiga rolo de la alkoholo en la milito abstinencigis.

Mi konas saĝan virinon, kiun la observo de la evidenta interligiteco inter virina mizero kaj alkoholismo tiom timigis, ke ŝi fariĝis abstinenca.

Mi konas lokomotivkondukiston, al kiu sufiĉis unu sola fervoja akcidento, por malfermi al li la okulojn pri la konekto inter alkoholtrinkado kaj fervojokatastrofoj, tiel ke li fariĝis abstinenca.

Mi konas homon, kiu eĉ lernis la **sumon** de la spertoj, kiujn faris la sep aliaj. Li eĉ « studis » la alkoholproblemon. Sed li ne fariĝis abstinenca, sed daŭrigis subteni la alkoholtrinkkutimon.

Kiom dikan kaŭton **li** devas havi!

O. Wanderer

(laŭ poŝtkarto de la Hoheneck-eldonejo).

# EL LA ESPERANTO-MOVADO

**Internacia Ce-Instituto de Esperanto** (sidejo en Hago, Oostduinlaan 32, Nederlando) estas fondita, por organizi ĉie en la mondo Esperanto-kursojn laŭ la sukcesa metodo de la rumana pastro Andre Ĉe. Ĝi havis speciale bonajn rezultojn en Svedujo, Latvujo kaj Nederlando, nun ankaŭ en Norvegujo. La plej bonaj instruistoj laŭ la Ce-metodo estas ĝis nun escepte de pastro Ĉe mem, la rumana advokato Tiberio Morariu, la estona instruisto Seppik kaj la germana gimnazia profesoro Felix Dyba.

**En Grekujo** nun en la gimnazioj de Ateno kaj Pireo pli ol 1500 lernantoj partoprenas la Esperanto-kursojn de D-ro Stamatiadis. Fondiĝis novaj studentaj kaj viriaj grupoj.

**Esperanto-kongresoj** nunjaraj jam estas anoncitaj en nia kongresa listo. Ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Oxford denove okazos Internacia Somera Universitato, en katolika diservo predikos la dominikano P. Gaffney O. P., prezidanto de la Irlanda Katolika Ligo Esperantista. — En **Budapest** la Katolika Esperanto-Kongreso (IKUE) promesas fariĝi bela sukceso. Ĝi pritraktos la temon « La Katolika Agado ». La generala sekretario de la Hungara Katolika Esperanto-Societo D-ro Lukács faris propagandvojaĝon tra tuta Eŭropo. — La socialistoj kaj komunistoj havos sian SAT-kongreson en London kaj atendas 600 kongresanojn. Krome tre multaj naciaj Esperanto-kongresoj en ĉi tiu jaro estis aŭ estos tute internaciaj pro granda eksterlanda ĉeestantaro, ekz. la belga, germana kaj itala kongresoj.

« **Skolta Heroldo** », organo de Skolta Esperantista Ligo, reviviĝis kaj nun provizore aperos trimonate kun 16 paĝoj kaj kun kelkaj propagandartikoloj nacilingvaj. La gazeto estas tre rekomendinda al skoltoj kaj al junuloj ĝenerale. Oni petu specimenojn de Pastro Ramboux, 22 Cours Albert I-er, Paris VIII.

# EL LA KATOLIKA PACA MOVADO

**En Aŭstrujo** la Katolika Paca Ligo fondita de nia amiko Kaspar Mayr jam sukcese komencis sian agadon.

**En Belgujo** la gazeto « La Terre Wallonne », redaktata de nia amiko Elie Baussart, sin dediĉis speciale al la problemoj de la paco kaj de la internacia katolika kunlaboro. Ĝi jam eldonis kelkajn tre atentindajn specialajn numerojn.

**En Francujo** la Ligo de la Francaj Katolikoj por la Internacia Justeco kaj la Paco ricevis belan leteron de Lia Kardinala Moŝto Verdier, ĉefepiskopo de Paris, kiu plendas, ke bedaŭrinde en kelkaj rondoj ankoraŭ troviĝas granda nescio de la katolika doktrino pri paco kaj internacia justeco, kio kondukis al bedaŭrindaj eraroj.

**En Germanujo** la Paca Ligo Katolika preparas sian kongreson en Paderborn, kiu okupiĝos pri la pedagogia aspekto de la paca movado. Oni pritraktos la pacan edukon ĉe la infanoj, en la popollernejoj, pli altaj lernejoj, universitatoj, en la junularaj grupoj ktp., kaj laŭ propono de nia amiko Heinz Kolvenbach oni ankaŭ prezentos instrulecionojn praktikajn. Ni esperas, ke la kongreso konsiderinde helpos, por enporti niajn ideojn en instruistajn rondojn.

**En Polujo** niaj amikoj Pastro Profesoro Hermann Hoffmann kaj Kaspar Mayr faris denove porpacan propagandvojaĝon, la movado tie nun bone progresas.

**En Svisujo** la Katholika Rondo de Genève (Cercle Catholique de Genève, 57, Rue du Rhône) tre sukcese kunigas gvidantajn katolikojn ĉiulandajn venantajn al la Ligo de Nacioj aŭ al aliaj gravaj oficialaj aŭ privataj institucioj troviĝantaj en Genève, en la servo de la paco kaj de internacia katolika kunlaboro. Nia sekvonta numero pli detale raportos pri tio.

**En Usono** la Katolika Asocio por Internacia Paco, kies prezidanto en ĉi tiu numero ion rakontas el sia agado, okazigis sian kongreson en aprilo en la Katolika Universitato de Weshington. Ĝi bone sukcesis, oni eĉ tre malfacilajn aktuale-politikajn temojn, kiel la Haiti-problemon, pritraktis. Lia Episkopa Moŝto Msgr. Thomas F. Lillis episkopo de Kansas City, estas elektita honora prezidanto. La konferenco okupiĝis speciale pri la paca agado en lernejoj kaj kolegioj. Oni proponis, aranĝi ĉiujare en la tuta lando por unu tago aŭ unu semajno specialan pacprogramon por ĉiuj katolikaj lernejoj, institutoj, universitatoj.



# Nia Movado

**Internacia Oficejo.**

**Multaj internaciaj kongresoj** okazas en ĉi tiuj monatoj. Ni esperas, ke ankaŭ multaj MOKA-anoj vizitos ilin kaj ke en kelkaj el ili specialaj MOKA-konferencoj estos eblaj. Disvastigu en la kongresoj niajn propagandilojn, specimenojn de nia gazeto J. B. kaj speciale — niajn ideojn!

**La ekzekutiva komitato** kunvenis la 25 majo en Velbert kaj kunvenos la 12-13 julio en Altenberg.

**Nia belga-germana konferenco** de katolikaj junularaj gvidantoj okazonta meze de julio en Altenberg promesas fariĝi tre sukcesa. Gvidantoj el preskaŭ ĉiuj katolikaj junularaj ligoj de ambaŭ landoj jam aliĝis.

**Vojaĝoj de la internacia sekretario.** Estas ankoraŭ ne definitive decidite, ĉu la stud- kaj propagandvojaĝo de Wilhelm Solzbacher en sudorienteŭropajn landojn efektiviĝos. Se tamen ĝi okazos, li vizitos de meze de aŭgusto ĝis meze de septembro eble sekvontajn urbojn en Aŭstrujo, Hungarujo, Polujo, Rumanujo, Jugoslavujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo : Wien-Bratislava-Budapest-Koŝke-Novy Targ-Kraicow-Beuthen-Przemysl-Lwow-Stanislawow-Kolomyja-Ĉernauti - Dej-Cluj-Alba Julia-Blaj-Sibiu-Fagaras-Brassov-Alba Julia-Timiŝoara-Beograd-Zagreb-Ljubljana-Graz - Salzburg-München. Amikoj kaj grupoj en tiuj regionoj, kiuj deziras viziton aŭ paroladon de nia internacia sekretario, skribu tuj pri tio!

**Multajn novajn membrojn** nia movado ankoraŭ bezonas. Ni esperas, ke almenaŭ en la sekvonta jaro povos aperi utila jarlibro de MOKA. Sed ĝis tiam ni bezonas reorganizon kaj kompletigon de nia delegitoreto.

**Radio-paroladoj de la internacia sekretario.** La okcidentgermanaj radiostacioj Köln, Langenberg, Aachen kaj Münster antaŭ nelonge finis serion de paroladoj pri internacia junulara agado (inter ili unu de Wilhelm Solzbacher) kaj nun komencis paroladserion « Junularo en aliaj landoj », kiu estas tre interesa. La paroladoj okazos merkrede vespere dufoje en la monato. Ni speciale atentigas pri tri (germanlingvaj) paroladoj de Wilhelm Solzbacher, kiuj okazos en aŭgusto kaj septembro : « Junularo en Ĉeĥoslovakujo », « La pola junularo », « La hungara junularo ». La ekzaktajn datojn vi trovos en la radio-gazetoj.

**Eldona Kooperativo La Juna Batalanto.**

**Membreco.** Nia membro D-ro Hinsenkamp-Essen plialtigis sian partoprenosumon de 30 al 60 markoj.

**Jubilea kolekto.** Ni danke kvitancas : Grupo de migranta junularo en V. 30.— RM, K. V. en G. 1.— RM, U. Z. en K. 1.— RM, sumo de la 2-a listo : 32.— RM, ĝisnuna tuta sumo : 97.50 RM. — Bedaŭrinde niaj geamikoj ŝajnas nesufiĉe kompreni la gravecon kaj urĝecon de nia alvoko : Helpu nian gazeton! Ni atendas multajn pluajn donacojn, speciale multajn **malgrandajn**. Ne pensu, ke nia kolekto estas nur por riĉuloj! Ni ĉiuj estas tre malriĉaj! Helpu, se eĉ nur per kelkaj groŝoj!

**Ĉe la multaj internaciaj kongresoj** de la nuna jaro LA JUNA BATALANTO devas esti diskonigata. Disvendu kaj disdonu specimenajn numerojn! Interesuloj povas jam nun ricevi ilin de la eldonejo. Ĝi ankaŭ vendas malmultekostajn Esperanto-lernolibrojn taŭgajn por propagando.

**La nombro de niaj abonantoj** estas ankoraŭ tute nesufiĉa. Ni bezonas tre intensan propagandon. La eldonejo jam komencis ĝin, dissendante multajn specimenojn, specialajn cirkulerojn en Esperanto kaj naciaj lingvoj ktp.; sed la eldonejo ne povas fari ĉion sola. Helpu, geamikoj! Petu specimenojn por propagando, varbu abonantojn; se vi tion bezonas, ni ankaŭ volonte sendos al vi varbcirkulerojn en iu lingvo. Sed ne lasu nin solaj en nia penado !

### Aŭstrujo.

**Wien.** Nia amiko Leopold Lackner gvidas Esperanto-kurson. — Nia amiko Kaspar Mayr faris diversajn propagandvojaĝojn por la paca movado al Polujo, Rumanujo, Grekujo kaj Jugoslavujo.

### Belgujo.

**La germana MOKA-sekretario** Kolvenbach estis en Belgujo de la 1 ĝis la 16 junio, por prepari eblecojn de kunlaboro inter katolika junularo de Belgujo kaj Germanujo. I. a. la germana MOKA-oficejo preparos kelkajn semajnfinvojaĝojn al la Internaciaj Ekspozicioj de Liège kaj Antwerpen. La vojaĝagentejo Dux de la Katolika Agado de Belgujo interkonsentis kun la germana nacia asocio de MOKA daŭran kunlaboron. — Pri la vojaĝoj de nia internacia sekretario en Belgujo ni jam raportis.

**Atentu, junaj katolikaj Esperantistaj komercistoj ĉiulandaj !** Nia amiko Michel Bonnet (48a rue V. Decoster, Louvain), vicsekretario de la Jeunesse Indépendante Catholique, kiu kunigas junajn komercistojn, teknikistojn, industriistojn kaj anojn de liberalaj profesioj, klopodas enkonduki Esperanton en sian ligon kaj krei internaciajn rilatojn kun katolikaj Esperantistaj komercistoj alilandaj. Niaj amikoj helpu lin!

### Germanujo.

**La nacia sekretario Heinz Kolvenbach** (Düsseldorf. Stoffeln 23) nun eldonas germanlingvan informbultenon (« Katholische Weltjugendliga, Werkblatt für den deutschen Landesverband »). La membro-kotizoj por MOKA (germana landa asocio) estas fiksitaj jene : individuaj membroj 0.10 M, grupoj ĝis 25 membroj 0,50 M, grupoj de 25 - 50 membroj 1,00 M, grupoj de 50-100 membroj 1,50 M monate. Abonantoj de La Juna Batalanto pagas 1.— RM po jaro (do 3.— RM entute). Kiu pro iu kaŭzo ne povas pagi, informu la sekretariejon! — La sekretario dissendis demandaron pri **L. d. N. - pedagogio** (instruado pri la Ligo de Nacioj). La germanaj MOKA-anoj partoprenos en la propaganda agado de la Internacia Virina Ligo, kiu okazos sub la devizo : « **La milito estas neleĝigita, ni postulas la neleĝigon de la militiloj! » La delegitoj ricevos la subskribolistojn meze de julio.**

**La kongreso de la Paca Ligo Katolika** okazonta en Paderborn (8-10 sept.) pritraktos la interesan temon « eduko al la paco ». I. a. la gvidantoj de la junularo estas speciale invitataj.

**Katolika Junularo de Germanujo.** Kunsido de la gvidantaro okazis la 2 julio en Düsseldorf. La ĉeftemo estis « la reformo de la terposedrajto », pri kiu paroladis D-ro Liertz. MOKA estis reprezentita per du delegitoj.

**Tra la Eifel-, Mosel- kaj Rhein-regiono** nac. sekr. Kolvenbach faris 13-22 aprilo propagandvojaĝon per biciklo. Multaj interesuloj, sed malmultaj estas pretaj akcepti propran respondecon. La radikala naciismo bedaŭrinde nun tie progresas.

**Pri la mondjunulara migrada servo** estu atentigata. Kiu volas migradi kun eksterlandaj gejunuloj en Germanujo, skribu al Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg.

**Paroladoj de Wilhelm Solzbacher** : 30 majo en Velbert (Rejnlando) : « Esenco kaj historio de la junulara movado » (invitis : Tutliga Grupo de Migranta Junularo), 22 junio en la junulara kastelo Freusburg : kunlaboro en interparolado pri Freusburg-junulara laboro disaŭdigita per la okcidentgermanaj radio-stacioj, 2 julio en Windthorstbund (katolika politika junularo) Köln-Nippes : « Defendopolitiko kaj internacia paco », 29 julio en laborkomunumo de katolikaj junulinaj ligoj en Köln : « La junularaj ligoj ».

**Berlin.** MOKA-delegitino nun estas Gertrud Odenthal, Berlin C 25, Kl. Alexanderstr. 1. — Laŭ « Erwachende Jugend » fondiĝis en kaj ĉirkaŭ Berlin novaj MOKA-grupoj.

**Düsseldorf.** MOKA estas reprezentita en la loka gvidantaro de la katolika junularo, la grupo nun speciale laboras, helpante la nacian sekretariejon. Kursoj de « Pestalozzi-lernejo de MOKA » (Esperanto, franca kaj angla lingvoj) progresas.



**Essen.** Bone funkcias la MOKA-grupoj kaj la Esperanto-kurso en la Popola Universitato. Oni preparas internaciajn vizitojn.

**Koeln.** Tre vizitinda estis nova Esperanto-ekspozicio okazinta kiel fako en la ekspozicio « Laboranta Junularo » de la Katolika Junmetiista Unuiĝo. « Ekaro » (Esperantista Kolpingana Aro) preparis ĝin, kaj multegaj homoj vizitis ĝin kun miro kaj admiro. I. a. oni vidis, kiel komunistoj, anarkiistoj, Oomoto ktp. uzas Esperanton, kaj je la alia flanko la faktojn pri la katolika Esperanto-movado. Kompreneble ankaŭ La Juna Batalanto havis honoran lokon. Ilustritaj poŝtkartoj el ĉiuj landoj, Esperanto-literaturo kaj bela simbola globo kun figuroj ĉirkaŭ subskribitaj « Ni ĉiuj parolas Esperanton! » estis tre efikaj.

**Neuss.** Sukcesa varbparolado por nia movado de Heinz Kolvenbach. Baldaŭ okazos ĉi tie semajnfina regiona kunveno de MOKA.

**Gazetaro.** Denove aperis multaj notoj pri nia movado, Esperanto, La Juna Batalanto. Speciale ni ĝojis pri nova rekomendo de J. B., en la gazeto « Lotsenrufe », eldonata de nia amiko D-ro N. Ehlen. — Ni atentigas pri grava artikolo de nia komitatano D-ro Leo Fleischer (Karlsruhe) aperinta en scienca revuo « Geopolitik » : « Nederlando kaj ĝiaj ekstremorientaj kolonioj ».

### Hungarujo.

**Vac.** En jarlibro de la Vaca pastra seminario dediĉita al la temo « Katolika Agado » nia nacia sekretario **Nemeth Laszlo** publikigis bonan, pli ol tripaĝan artikolon pri la rolo de Esperanto por la Katolika Agado. Li ankaŭ atentigis pri MOKA, La Juna Batalanto, la kongreso de Barcelona ktp.

### Ĉinujo.

**Nia nacia sekretario** Pastro Joh. Bapt. Kao O. F. M. nun jam troviĝas en vojaĝo al Eŭropo, por ankoraŭ studi en la internacia franciskana universitato en Romo. Lian lastan karton ni ricevis el Tai-Yuan-Fu. Kiel li skribas, la MOKA-kaj Esperanto-agado estos daŭrigata inter la ĉinaj katolikoj per liaj fervoraj kunlaborantoj. Andreo Chang estas petita akcepti la postenon de nacia sekretario de MOKA por Ĉinujo. Ni pri tio ankoraŭ raportos. — Cetere la Asocio de la Ĉina Katolika Junularo elektis Pastron Kao kunredaktoro de sia oficiala gazeto, tiel ke ankaŭ tiamaniere bona influo de MOKA al la junularo de tiu vasta lando estas garantiata. Vivu la ĉina MOKA-movado!

### Italujo.

Nia amiko Pastro Modesto Carolfi O. F. M. translokiĝis al Guastalla. En la Episkopa Seminario de Guastalla li gvidas Esperanto-kurson.

### Japanujo.

**En la katolika gazeto « Koe »** (Vox Catholica) nia japana amiko Pastro Francisko Ksaverio Abe S. J. publikigis noton pri nia movado, kiu jam vekis ĝojigan intereson. Kiel vi vidas en ĉi tiu numero, ni ankaŭ jam havas junan japanan katolikon kiel korespondanton de J. B.

### Litovujo.

**En la granda nacia ekspozicio** de Kaŭnas ankaŭ La Juna Batalanto kaj la eldonaĵoj de MOKA estas elmetitaj.

### Polujo.

« **Pola Esperantisto** » publikigis anoncon pri J. B.

### Rumanujo.

**La internacia sekretario** de MOKA esperas veni en la landon en la nunjara aŭtuno. I. a. li havos konferencon kun la Protektoro de nia movado, Lia Episkopa Moŝto D-ro G. K. grafo Majlath, episkopo de Transilvanio.

# Gravaj Internaciaj Kongresoj Kaj Kunvenoj 1930

En la listo enhavanta pli ol 40 tiajn internaciajn aranĝojn kaj publikigita en la maja numero de J. B. bonvolu forstreki (pro ŝanĝo de lokoaŭ dato) la kongresojn de : **Innsbruck**, **London**, **Freusburg** kaj **München-Koeln**. Aldonu jenajn novajn resp. ŝanĝitajn kongresojn :

| | | |
|---|---|---|
| 17-20 julio | Köln (Germ.) | Int. Generala Konsilantaro de la Katolika Junmetiista Unuiĝo kun inaŭguro de la nova ĉefsekretariejo. Katholischer Gesellenverein, Haus des Gesellenvereins, Kolpingsplatz, Köln. |
| 25-27 julio | Paris (Franc.) | Int. kongrlso de la Internacia Konfederacio de la milit-invalidoj kaj eksmilitistoj (CIAMAC). Kongresejo : Sorbonne-Universitato. |
| Aŭgusto | Bruxelles (Belg.) | Kongreso de la Internacia Studenta Konfederacio. C.I.E., 82 Av. Molière, Bruxelles. |
| 1-10 aŭgusto | Darmstadt (Germ.) | Sport-Olimpiado de la Int. Stud. Konf., sama adreso. |
| Aŭgusto | Oxford (Brit.) | Generala Konf. de Internacia Studenta Servo (I. S. S.) en Hugh's College. I. S. S., 13, Rue Calvin, Genève, Svis. |
| 3-7 aŭgusto | London (Brit.) | Proleta Esperanto-Kongreso (SAT), Conway Hall, Red Lion Square, Holborn, London WC 1. |
| 20-21 aŭgusto | Budapest (Hung.) | Internacia kunveno de la Kat. Junmetiista Unuiĝo. KGV, Haus des Gesellenvereins, Kolpingsplatz, Köln, Germ. |
| 21-30 aŭgusto | Trogen ob St. Gallen (Svis.) | Internacia Junulara Tendaro. Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg. |
| 26-28 aŭgusto | Berlin (Germ.) | Internacia Gvidantaro de la daŭriga laboro de la Mondjunuara Paca Kongreso de Ommen. Marguerite de Goeijen, Frans Halslaan 12, Bilthoven, Nederlando. |
| 6-7 sept. | Liège-Antwerpen (Belg.) | semajnfin vojaĝo de MOKA al la internacioj ekspozicioj H. Kolvenbach, Düsseldorf, Stoffeln 23, Germ. |
| 8-12 septembro | Feldkirch (Aŭstrujo) | X-a Internacia Katolika Kongreso de IKA. Temo : La bolŝevismo en Rusujo kaj en la tuta mondo kaj ĝiaj religiaj-kulturaj efikoj. Msgr. Dr. N. Pfeiffer, Tovarna u. 3, Košice, Ĉehosl. |
| Septembro | Warszawa (Pol.) | Internacia kongreso kontraŭ knabinkomerco kaj prostitucio. Baronesse de Montenach, 22 Rue St. Pierre, Fribourg, Svisujo. |
| Septembro | Frankfurt a. M. (Germ.) | Internacia Kongreso por Sociala Servo. M. Maus, 75 Rue d'Arlon, Bruxelles, Belg. |
| Septembro | Genève (Svis.) | Internacia Katolika Sociala Semajno. Cercle Catholique de Genève, 57, Rue du Rhône, Genève. |
| Septembro | München (Germ.) | Kongreso de PAX ROMANA, internacia katolika studenta ligo (la dua parto en Köln, kiun ni anoncis, ne okazos). |
| 22-26 sept. | Basel (Svis.) | Internacia Katolika Karita Kongreso. Kanoniko Prof. D. Müller-Simonis, Strasbourg-Franc. |

**JUBILEA KOLEKTO por J. B. estas malfermita okaze de la dekjara ekzisto de nia MOKA-movado. Ĝi devas helpi, por ebligi pli grandskalan propagandon. Ĉu ne ankaŭ vi povus ion donaci por ĝi?**

Presejo: Imp. DISONAISE, S. Winandy, Dison. Tél. 1398.